

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA  
SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO!

# Sennaciulo



Sennaciulo estas la oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

<http://www.satesperanto.org/>

novembro - decembro -2010, n-ro 11-12 ( 1265 - 1266 )

**Nia dosiero -Mondmilito**



# 84-a SAT-KONGRESO

SARAJEVO 30.07 – 06.08.2011

Temo: ***Tutmondiĝo kaj naĉla fenomeno***

## ADRESOJ DE LA ORGANIZA KONGRESA KOMITATO

Poŝtadreso:  
**84-a SAT-KONGRESO**  
Pf. 452  
Kralja Tvrtka 19  
BA-71000 SARAJEVO  
Bosnio kaj Hercegovino  
Telefono: +387 33 205 487  
Telefakso: +387 33 205 487

Retadreso:  
[www.esperanto.ba](http://www.esperanto.ba)  
[www.satesperanto.org](http://www.satesperanto.org)  
[info@esperanto.ba](mailto:info@esperanto.ba)  
[satkongreso@esperanto.ba](mailto:satkongreso@esperanto.ba)  
programkontribuantoj: [satprogramo@esperanto.ba](mailto:satprogramo@esperanto.ba)  
[fetah.zvirac@energoinvest.com](mailto:fetah.zvirac@energoinvest.com)  
[senad.colic@esperanto.ba](mailto:senad.colic@esperanto.ba)

Sur frontopaĝo estas foto de la “Frauenkirche” en urbo Dresdeno. Ĝi plene detruigis je fino de la dua mondmilito kaj restis detruita dum la komunisma reĝimo. Post rekunigo de Germanio, homoj luktis por rekonstrui ĝin en originala formo. Nun ĝi rehas la originalan brilon kaj belecon.

# SAT-Kotizo 2010

Argentino	27 €
Aŭstralio	52 €
Aŭstrio	52 €
Belgio	52 €
Bosnio-Herceg	10 €
Brazilio	22 €
Britio	45 GBP
Bulgario	12 €
Ĉeĥio	20 €
Ĉinio	45 CNY
Danio	52 €
Estonio	12 €
Finnlando	52 €
Francio	52 €
Germanio	52 €
Hispanio	40 €
Hungario	12 €
Italio	50 €
Israelo	32 €
Japanio	7150 JPY
Kanado	81 CAD
Koreio	33 €
Kroatio	12 € (90 HRK)
Latvio	12 €
Litovio	12 €
Malagasio	5 €
Nederlando	52 €
Norvegio	52 €
Pollando	12 €
Portugaliao	30 €
Rusio	12 €
Serbio	12 €
Slovakio	12 €
Slovenio	12 €
Svedio	52 €
Svisio	79 CHF
Ukrainio	12 €
Usono	74 USD

Dumviva membreco : 1300 €

Por la nemenciitaj landoj la aliĝo al SAT estas 5 € kaj la PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando. Nura abono al sennaciulo : unika abontarifo por ĉiuj 57 €

Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo. El la indikita sumo, 40 % estas la kotizo kaj 60 % la abono.

Help- kaj grupmembroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

Pagante la sumon aparte indikitan, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

## Donacoj

Moerbeek NL 3 €	Aliot C. FR 152 €
Veen NL 8 €	Scherm D 130 €
Sims GB 15 £	Lanz F. FR 150 €
Markarian GB 7£	Anonime FR 125 €
Lane GB 20 £	Anonime FR 125 €
Prent GB 15 £	Hammerberg SE 90 €
Fathaigh GB 2 £	Anonime FR 600 €
Simons GB 7 £	Anonime FR 125 €
Howard GB 5 £	AJF de Wit NL 100 €
Keable GB 20 £	JW Moonen NL 98 €
Kelso GB 5 £	S. de Korte NL 48 €
Cagnard FR 48 €	J. Flach NL 48 €
Angot FR 5 €	Lvd Kamp-den-Hagen NL 48 €
Beteau FR 8 €	A. Kriek NL 8 €
Peyrouy FR 5 €	H. Nijboer NL 4 €
Gregoire FR 3 €	A. Ter Braak NL 48 €
Signoret FR 48 €	Anonime FR 900 €
Martin-Levêque FR 14 €	Hammerberg SE 44€
Hammarberg SE 90 €	Anonime FR 125 €
Anonime FR 2000 €	Hammarberg SE 22.- €
Dehan FR 18 €	

**La dosiero de la sekvonta numero de Sennaciulo estas:**


## Limoj de toleremo

**Kio estas toleremo kaj kie troviĝas la limo.**

**Tekstojn vi sendu antaŭ la 31-an de decembro al [sennaciulo@telenet.be](mailto:sennaciulo@telenet.be)**

## KZ (ka-cet)

Nepre ligatas al dua mondmilito la memorigo pri la „institutio“ KZ (siatempe mallonge „KL“ = Konzentrationslager, koncentriga kampo, koncentrejo) kaj pri la kruelega persekuto kaj



laŭplana amasmortigo de judoj. En la tuta mondo konatas la loko Auschwitz (aŭŝvic - Oświęcim) kiel simbolo por tiu senhomeca perforto. Sed komence KZ-oj ne estis lokoj precipe por judoj nek lokoj de ilia ekstermo. Estis ejo por turmenti kaj torturi politikan opozicion. La termino unuafoje aperis en 1896 dum la milito en Kubo pri sendependeco de la hispana koloni-imperio kaj dum la milito en Sudafriko 1899 ĝis 1902 – Brita Imperio kontraŭ Oranĝio kaj Transval.

Kiam Hitler estis nomumita kanceliero de Germana Regno la 31an de januaro 1933, li antaŭsentis, ke sia partio NSDAP ne gajnos vastan konsenton. Fakte la balotoj en 5a de marto 1933 rezultigis „nur“ 43,9% por la naziuloj. Hitler preparis la batalon kontraŭ ĉia opozicio. Li ordonis tuj aresti senescepte ĉiujn elektitajn komunistajn parlamentanojn tuj post akcepto de la mandato.<sup>1</sup> Ke tio legeblis en la gazeto samtempe, celis disvastigi timon kaj tiamaniere subpremi proteston de simpatizantoj de la opozicio. La ordono trafis ne nur anojn de la komunistaj partio, sed ankaŭ socialdemokratojn ktp.

1 Dokumento 01 aresti

Ĉar la normalaj malliberejoj estis tro plenaj, li komisiis la policĉefon de Munkeno, partiano Heinrich Himmler (hajnrĥ himler) serĉi taŭgan lokon por arestado de kvin mil homoj. Himmler trovis lokon proksime al Munkeno, iaman fabrikon de municio, apude polickazerno. La 21an de marto legeblis en gazeto, ke venontan tagon, „merkrede malfermiĝos la unua koncentrejo proksime al Dachau“.<sup>2</sup> Kaj „Dachau“ evoluiĝis kiel modelo de ĉiuj sekvaj koncentrejoj. En la kampo ĉiu arestito perdis sian nomon, sian dignon kaj sian havaĵon. Li estis traktata kiel sklavo kaj devis labori antaŭ ĉio en la militindustrio.<sup>3</sup> Multaj entreprenoj ekzistantaj eĉ nuntempe profitis: AEG, BMW, Daimler-Banz, SIEMENS... Oni nur pagis etan rekompenson al la ŝtato – ne al la laboristoj. Kaj kreskis la aro da sklavoj dum la milito: homoj el la konkeritaj landoj kaj judoj el tuta Eŭropo.

Kio estas konsiderata malamiko aŭ opozicilo estis arbitra decido. Martin Niemöller (nimeler),



**Ein Konzentrationslager für politische Gefangene in der Nähe von Dachau**

In einer Pressebesprechung teilte der kommandierende Polizeipräsident von München Himmler mit:

Am Mittwoch wird in der Nähe von Dachau das erste Konzentrationslager eröffnet. Es hat ein Fassungsvermögen von 5000 Menschen. Hier werden die gesamten kommunistischen und – soweit notwendig – marxistischen Funktionäre, die die Sicherheit des Staates gefährden, zusammengezogen, da es auf die Dauer nicht möglich ist, wenn der Staatsapparat nicht so sehr belastet werden soll, die einzelnen kommunistischen Funktionäre in den Gefängnissen zu lassen, während es andererseits auch nicht angängig ist, diese Funktionäre wieder in die Freiheit zu lassen. Bei einzelnen Versuchen, die wir gemacht haben, war der Erfolg der, daß sie weiter heben und zu organisieren versuchen. Wir haben diese Maßnahme ohne jede Rücksicht auf kleinliche Bedenken getroffen.

evangelia pastro, poste esprimis tiel:

“Kiam la naziulo venigis la komunistojn, mi silentis; mi ne estis komunisto.

Kiam ili arestis la socialdemokratojn, mi silentis; ĉar mi ne estis socialdemokrato.

Kiam ili venigis sindikatanojn, mi ne

2 Dokumento 02 gazeto

3 Dokumento 03 sklavlaboro